

REVUO

Monata Aldono al Esperanto Triumfonta

NUMERO 5

1923

MARTO

KIO estus nia vivo sen idealoj? Dezerta, sovaĝa valo, — profunda, malluma abismo. Kaj el tiu abismo ni ne plu trovus eliron al alto, al lumo.

Multmilionoj da homoj tiel palpas en mallumo, ĉar ili mankis la ĝustan vojon, kaj ili fine pereas en nokto, eĉ ne vidinte la lumon, eĉ ne ekkoninte la belecon de l' mondo.

Kaj kiom ĝi estas bela, la mondo!

Se ĉiu atribuus sian parton, la mondo povus fariĝi eĉ la Paradizo mem, kaj la Ora Tempo, pri kiu oni tiom revadas, kiun oni sopiregadas de antikvaj tempoj, ekestus!

Por kio ni naskiĝis Homo? Por nobligi nin mem kaj aliajn, por progresigi la Kulturon, por kiel eble plej agrabligi ĉiuflanke nian propran vivon kaj tiun de nia kunhomo. Kiu plenumas tiun fundamentan homan devon, tiu jam spertas la ĉielon surtere, tiu estas jam ĉi-sube feliĉa kaj benata.

Jes, bela ĝi estas, la mondo, kaj granda kaj vasta! Havas lokon por ĉiu.

Kaj tamen la milionoj disputas pro loketo, tamen ili envias unu al alia la multe da havaĵo, tamen ili atakas kaj buĉas unu alian, ne sentante, ke per tio ili reĵetas la kulturon je jardekoj, ke per tio plej grandan malutilon ili kaŭzas al si mem kaj al tuta korpo Homaro, kies ili mem estas membro, — ke ili rekte kontraŭagas siajn proprajn celojn, siajn fundamentajn homajn devojn.

Malamikoj! Ĉu vere bona, nobla, idealista homo entute iun povas nomi malamiko? Sur tiujn, kiuj en sia malspriteco intencas malbonon kontraŭ li, li — de sia lumalto — ja povas nur komplete malsupren rigardi.

Malamikoj! Vere nobla homo ne konas malamikojn. Li konas nur homojn, naskiĝintaj ĉiuj por samaj fundamentaj celoj, por samaj fundamentaj devoj, — kun la sola diferenco, ke unuj pli, aliaj malpli ekkonis la celon de sia ekzistado; sed ĉiuj havas koron kaj animon, ĉiuj estas dotitaj je intelekto kaj konscio, mallonge: ĉiuj estas — homoj!

Printempo.

*Nebulan vualon
radioj disŝiris.
De mont' mi rigardas
en valon profundan,
admiras sur kampoj
verdiĝon abundan:
Degelis la vintro,
printempo eniris.*

*Printempo eniris.
De loko al loko
esperon ĝi portu
al kor' kaj kamparo,
ke baldaŭ alvenu
por tuta Homaro
printemp' sopirata —
la Ora Epoko!*

T. J.

T. J.

Kial mi fariĝis Esperantistino?

Mi ĵus estis leganta Esperantan libron. La min vizitanta amikino ekkriis: „Ĉu vi denove okupas vin pri utilaĵo?“ „Mi kore deziras, ke ĝi fariĝu utila por la homaro; sed ĉu ĝi utilas por mi? Karulino, por mi ĝi signifas multe pli ol tio, ĝi donis al mi novan esperemon, novan kredemon je la homaro. Ĉu mi rakontu al vi miajn suferojn pri la nuna vivo, pri ĉi tiu malplenega vivo, en kiu jam de jaroj regas la senvaloraĵoj, kaj niajn plej altajn idealojn ni vidas renversitaj? Ni ĉiuj kun abomeno spertas ĉiupaŝe la ruinigon de l' moroj, la superecon de sentaŭgaĵoj super veraj animvaloroj, ni estas devigitaj rigardi la iom-post-ioman malproksimiĝon de l' homoj de la homeco. Kien kondukos ĉi tio? Ĉu la senvalorigado de l' homa indeco daŭriĝos? Ĉu mi ne pravas malŝati ĉi tiun vivon, ĉu mi ne malesperu? Nenie lumradio, kiu montrus vojon, sur kiu la homaro povus sin trovi . . . Estus tro longe rakonti pri miaj duboj, ĉu tia vivo estas inda por travivi . . . Tia estis mia animstato, kiam mi hazarde, tuthazarde ekkonatiĝis kun Esperanto. Estu benata tiu horo! La lingvon mi lernis, mi ekkonis, . . . sed

ne nur ekkonis, mi ekamis la t. n. internan ideon, la sugesta forto de la Zamenhofaj ideoj entuziasmigis min, ili trafluis mian koron, ili vigligis mian animon, ili ebligis al mi denove esperi! Esperu, ke paŝante ĉi tiun vojon, la homoj alproksimiĝos unu al alia, konsiderante la komunan celon, ili paŝo post paŝo forĵetos ion el la balasto de malamo kaj malamikeco. Bela kaj ideala celo, sed en kia malproksimeco estas la realiĝo! La tasko de ni Esperantistoj estas: konduki la homaron sur ĉi tiun vojon; etendi fratan manon al ĉiu homarano, montrante ke »komprenante unu la alian« ankaŭ signifas animkomprenon. Ĉu ekzistas pli bela tasko ol tio? Esperantistoj! Ni donu ekzemplon al la aliaj, ni konduku inde al niaj altaj idealoj, ni ne nur parolu, sed pensu kaj agu ĉiam kaj ĉie Esperante. Ni estu fidelaj al la Zamenhofaj ideoj, ĉar nur per tio ni akiros novajn adeptojn por nia movado kaj per la firma sekvo de jenaj ideoj ni alproksimiĝos nian celon, — la Esperantigon kaj plifeliĝigon de l' homaro. Ĉu vi nun scias, kial mi fariĝis Esperantistino?“

N. Kozma.

.....

El „La Ĝardenisto“.

De Rabindra Nath Tagore. — Trad. E. Wiesenfeld.

SE VI VOLUS esti diligenta kaj plenigi vian kruĉon, venu, ho venu al mia lago! La akvo ĉirkaŭprenos viajn piedojn kaj elbalbutos sian sekreton. La ombro de l' venanta pluvo kuŝiĝas sur la sablon, kaj la nuboj pendas malalte super la bluaj linioj de l' arboj, kiel la pezaj haroj super viaj okulbrovoj. Mi konas bonege la ritmon de viaj paŝoj, ĝi frapas en mian koron. Venu, ho venu al mia lago, se vi devas plenigi vian kruĉon!

Se vi volus esti senokupa kaj sidi senvigle kaj lasi vian kruĉon flosanta sur la akvo, venu, ho venu al mia lago! La herbumita deklivo estas verda, kaj la sovaĝaj floroj sennombraj. Viaj pensoj forflugos el viaj malhelaj okuloj, kiel birdoj el siaj nestoj. Via vualo falos al viaj piedoj. Venu, ho venu al mia lago, se vi devas sidi senokupe.

Se vi havus sufiĉe viajn ludojn kaj volus eniĝi en la akvon, venu, ho venu al mia lago!
Lasu vian bluan mantelon kuŝi sur la bordo, la blua akvo kovros kaj kaŝos vin.
La ondoj stariĝos sur piedfingroj por kisi vian kolon kaj flustri en viajn orelojn.
Venu, ho venu al mia lago, se vi volus eniĝi en la akvon!

Se vi devos esti freneza kaj salti en vian morton, venu, ho venu al mia lago!

Ĝi estas malvarmeta kaj ne sondeble profunda.

Ĝi estas malhela kiel dormo, kiu estas sen songoj.

En ĝia profundo noktoj kaj tagoj estas unu, kaj kantoj estas silento.

Venu, ho venu al mia lago, se vi volus vin ĵeti en vian morton!

*

*

*

MI KURAS, kiel kuras en la ombro de l' arbaro moskulo, kiu freneziĝis de sia
propraodoro.

La nokt' estas nokto mez-maja, kaj la vento — vent' de la Sudo.

Mi perdas mian vojon kaj vagas, mi serĉas kion mi ne povas atingi, mi atingas
kion mi ne serĉis.

El mia koro elvenas kaj dancas la bildo de mia propra ŝopiro.

La brilanta vizio fandiĝas.

Mi pensas ĝin ekpreni forte, sed ĝi evitas min kaj erarigas.

Mi serĉas kion mi ne povas atingi, mi atingas kion mi ne serĉis.

*

*

*

NE KAŜU POR VI la sekreton de l' koro, ho, mia amiko!

Diru ĝin al mi, nur al mi, en sekreto!

Vi, kiu ridetas tiel dolĉe, rakontu mallaŭte, mia koro ekaŭdos ĝin, ne miaj oreloj.

La nokt' estas profunda, la domo — silenta, la birdaj nestoj — vualitaj per songo.

Parolu al mi tra hezitaj larmoj, tra retenitaj ridetoj, tra dolĉa hont' kaj doloro, la
sekreton de via koro!

*

*

*

MI AMAS VIN, amato. Pardonu mian amon!

Kiel birdo, perdinta sian vojon, mi estas kaptita.

Kiam mia koro skuiĝis, ĝi perdis sian vualon kaj nudiĝis. Kovru ĝin per kompato
kaj pardonu al mi, amato, mian amon!

Se vi ne povas min ami, amato, pardonu al mi mian doloron!

Ne rigardu min kun malestimo de malproksime.

Mi ŝtelrampos en mian angulon kaj sidos en mallumo.

Ambaŭmane mi kovros mian nudan honton.

Forturnu vian vizaĝon de mi, amato, kaj pardonu al mi mian doloron!

Se vi amas min, amato, pardonu al mi mian ĝojon!

Kiam mian koron forportas ondo de feliĉo, ne ridu je mia danĝera malzorgemo.

Kiam mi sidas sur mia trono kaj regas vin per mia tiraneco de amo, kiam — simile
al diino — mi donacas al vi mian favoron, elportu mian fieron, amata, kaj
pardonu al mi mian ĝojon!

*

*

*

MI SOPIRAS ELDIRI la plej profundajn vortojn, kiujn mi havas por diri al vi, sed mi ne kuraĝas pro timo, ke vi povus ridi.

Jen tial mi ridas je mi mem — kaj perfidas mian sekreton en ŝerco.

Mi malgravigas mian suferon pro timo, ke tion povus fari vi.

Mi sopiras diri al vi la plej sincerajn vortojn, kiujn mi havas por diri al vi, sed mi ne kuraĝas pro timo, ke vi povus ne kredi ilin.

Jen tial mi alivestigas ilin en malveron kaj diras la kontraŭon de tio, kion mi pensas.

Mi ŝajnigas mian suferon bagatela pro timo, ke tion povus fari vi.

Mi sopiras uzadi la plej karajn vortojn, kiujn mi nur havas por vi; sed mi ne kuraĝas pro timo, ke mi povus ne esti rekompencita egalvalore.

Jen tial mi donas al vi maldelikatajn nomojn kaj fanfaronas pri mia obstina severecco.

Mi vin turmentas pro timo, ke vi povus neniam ekkoni suferon.

Mi sopiras sidi silente apud vi; sed mi ne kuraĝas, por ke la koro ne elvenu sur miajn lipojn.

Jen tial mi babilas kaj plaŭdas malserioze kaj kaŝas mian kordon malantaŭ vortoj.

Mi kruele tenas mian doloron pro timo, ke tion povus fari vi.

Mi sopiras foriri de via flanko; sed mi ne kuraĝas pro timo, ke vi povus ekkoni mian malkuraĝecon.

Jen tial mi portas alte mian kapon kaj senzorge eniras en vian societon.

Senĉesaj pikoj de viaj okuloj tenas mian suferon freŝa por ĉiam.

*

*

*

NI DEVAS LUDI la ludon de morto hodiaŭ nokte, mia fianĉino kaj mi.

La nokto estas nigra, la nuboj sur la ĉielo estas kapricemaj, kaj la ondoj sur la maro estas furiozaj.

Ni forlasis nian rev-liton, elrompis la pordon kaj eliris, mia fianĉino kaj mi.

Ni sidas sur balancilo, kaj la uraganaj ventoj donas al ni sovaĝan ekpuŝon el malantaŭe.

Mia fianĉino suprenflugas pro timo kaj ravo, ŝi tremas kaj alpremas sin al mia brusto.

Longe mi servis al ŝi ameme.

Mi sternis por ŝi kuŝejon el floroj kaj fermadis la pordojn por forigi de ŝiaj okuloj la akran lumegon.

Mi kisadis ŝin dolĉe en ŝiajn lipojn kaj murmuradis mallaŭte en ŝiajn orelojn ĝis ŝi duonsvenis en sopiro.

Ŝi perdiĝadis en la senfinaj nebuloj de malklara dolĉeco.

Ŝi ne respondadis je miaj altuŝoj, miaj kantoj ne scipovis ŝin veki.

Hodiaŭ nokte venis al ni la voko de l' uragano el la dezerto.

Mia fianĉino ekstremis kaj leviĝis, ŝi kaptis mian manon kaj eliris.

Ŝiaj haroj flugas en la vento, ŝia vualo flirtas, ŝia girlando bruetas sur ŝia brusto.

La puŝo de morto enbalancis ŝin en la vivon.

Ni estas vizaĝo ĉe vizaĝo kaj koro ĉe koro, mia fianĉino kaj mi.



Perikles.

Ĉetomba parolado por la militmortintoj (431 a. Kr.)

La plimulto el tiuj, kiuj parolis ĉi tie antaŭ mi, kutime faris laŭdan paroladon por tiu, kiu dekretis, ke okaze de enterigo estu farata funebra parolado, ĉar ili mem sin sentis honoritaj per la komisio, proklami la laŭdon de la militmortintoj. Sed al mi ŝajnas esti pli konvene, ke la faroj de bravuloj estu honorataj per faro, t. e. per ĉi tiu solena enterigo, — ne per parolado, ĉar ĝi povas esti konfidata same al lerta kiel ankaŭ al mallerta oratoro; ĉar estas malfacile paroladi ĝuste, kaj imagon pri la faroj, konforman al la realaj faktoj, ne povas reprodukti la parolado. Ĉar, kiu mem kunagis, plejofte trovos la preskribon de l' oratoro malsupera al sia espero; sed kiu ne partoprenis, facile opinios kelkion troigita, aŭdante pri faroj, kiuj superas liajn fortojn. Jen la envio naskiĝas, ĉar la homoj emas aŭskulti laŭdojn je aliaj, dum ili mem sin opinias kapablaj je tiaj faroj, sed rifuzi la kredon al ĉio, kio superas ĉi tion. Sed, ĉar rito kaj leĝo postulas la paroladon, mi devas konsenti kaj kontentigi ĉiujn dezirojn kiom mi kapablas.

Mi komencas per niaj prauloj; tion postulas la justeco, kaj ankaŭ ĉi tiu soleno estas inda motivo memorigi pri ili.

Neniam ili volis forlasi ĉi tiun nian patrolandon, sed daŭrigis ĝian vivon de generacio al generacio, kaj al ilia braveco ni dankas la liberecon de la hejma tero. Kaj ĉi tiun heredaĵon niaj patroj eĉ pli grandigis kaj forte klopodinte transdonis al ni potencon patrolandon. Sed ni, la nuntempoj, kaj precipe tiuj el ni, kiuj estas en matura aĝo, kondukis ĝian potencon ĝis plej brila florado. Per ni la urbo sendependiĝis tiel, ke ĝi povas stari sur propraj piedoj en pacaj kaj militaj tempoj. Kiamaniere tio fariĝis, mi ne bezonas diri al viroj, kiuj kunhelpis atingi ĉi tiun staton. Sed certe mi parolos pri tio, per kia opiniaro, kiaj aranĝoj kaj kiaj principoj ni atingis ĉi tiun celon, kaj poste mi transiros al la laŭdo por la mortintoj. Mi pensas, ke vi ĉiuj, urbanoj kaj fremduloj, aŭskultos tion je via propra profito.

Ni havas konstitucion, formitan ne laŭ la modelo de aliaj konstitucioj, sed kiu pliĝuste servas kiel modelo al eksterlandaj. Prave oni nomas ĝin demokrata, ĉar la potenco ne estas en la manoj de malmultaj, sed de ĉiuj. Ĉiu havas ne nur la saman rajton en siaj privataj aferoj kiel ĉiu alia, sed ankaŭ ni ne konas la organizon laŭ kasto. Ĉiu povas atingi ĉian ŝtatan oficon, al kiu lia kapableco lin taŭgigas. Eĉ malriĉeco lin ne malhelpas en tio. Kun libereco ni agas en ĉiuj publikaj aferoj, per libereco ankaŭ ni sufokas la malfidon, kiu tiel facile estiĝas en la ĉiutagaj interrilatoj. Ni ne koleras kontraŭ la najbaro, se foje li agas ne tute korekte kaj ne dekretas punojn, kiel faras la Lakedemonoj, punojn, kiuj ne malutilas al la monujo, sed kiujn vidante ekindignas la okulo. En la ĉiutagaj interrilatoj ni estas sen severeco kaj pedanteco, sed en la publika vivo ni respektas preskaŭ timeme la leĝojn, precipe tiujn, kiuj estas kreitaj por la protekto al la malfortuloj, kaj kiuj, kvankam ne enkodigite, tamen alportas malhonoron al la malobeinto.

Por la spirito, lacigita per penado kaj laboroj, ni kreis multajn refreŝigojn: per konkurbataloj, ĉiujaraj oferfestoj, komforta aranĝo de la doma vivo. Pro la grandeco de nia urbo alfluas al ni de ĉiuj flankoj la produktoj el fremdaj landoj, kaj tion, kion produktas nia propra lando, ni ne povas ĝui pli multe ol tion, kio venas al ni el ekstere.

Ankaŭ koncerne la militajn rilatojn al aliaj ni diferencas de niaj kontraŭuloj en tio, ke ni permesas al ĉiu eniri nian urbon, ne elpelas la fremdulojn kaj ilin ne malhelpas lerni ĉe ni kaj de ni. Fremda estas al ni la pedanta suspekto, ke la fremdulo profitos la okazon spionumi sekretojn, ĉar ni fidas pli multe al nia agemo kaj kuraĝo, ol al grandaj militrimedoj kaj ĉiuspecaj ruzoj. Aliaj penas per teda milita edukado enekzercigi al siaj burĝoj la bravecon jam de la frua, junula aĝo; ni tion ne faras kaj tamen iras en la necertan batalon kun la sama decidemo.

Tion pruvas, ke la spartanoj opinias necese, mobilizi kontraŭ ni kiel eble plej multajn liganojn. Se ni atakas, plejofte la venko estas nia. Sed nian tutan milit-potencon ankoraŭ neniu vidis kontraŭ si, ĉar ni ne nur zorge perfektigas nian ŝiparon krom la armeo, sed ankaŭ ni dislokas la lastan sur multajn punktojn. Se ili foje venkas parton de nia potenco, ili fanfaronas, ke ili venkis nian tutan potencon; se ili estas venkataj, ili asertas, ke ili subiĝis al nia tuta potenco.

Ankaŭ en kelkia alia rilato nia urbo estas admirinda. Ni ŝatas la belon ne dorlotante nin. Nia riĉaĵo estas instigo por ni forte agadi, ne vante fanfaronadi. Konfesi sian malriĉecon, ne estas malriĉeco, ne estas malhonoro ĉe ni, sed certe konfesi, ke oni ne penas kontraŭbatali la malriĉecon pro mallaboremo. Niaj burĝoj sin dediĉas kun la sama sindono al privataj kaj al publikaj interesoj; terkulturistoj kaj metiistoj estas politike kleraj viroj, ĉar, kiu evitas la vivon publikan, tiun oni opinias ne pacama, bona burĝo, sed senutilulo. Ankaŭ ni ne apartenas al tiuj, kiuj pensas, ke elokventeco kaj agemo esceptas unu la alian. Pliĝuste ni scias, ke senkonsideraĵoj sekvas, se oni agas sen antaŭa, ĝisfunda informiĝo. Tiamaniere gaja kuraĝo kaj konsiderema prudento ĉe ni kuniĝis; aliaj estas kuraĝaj nur tial, ĉar ili ne konas la danĝeron kaj timemiĝas, kiam ili pri ĝi ekkonscias. Sed la plej fortaj oni ja opinias tiujn, kiuj, plene konsciante la grandecon de l' danĝero, tamen ne evitas ĝin tremante.

Ankaŭ pri la bonfarado ni havas alian opinion ol la plimulto de la homoj. Ne akceptante bonfarojn oni akiras amikojn, sed tiajn donante. La bonfaranto penas konservi la dankosenton de l' ricevanto per daŭraj bonfaradoj. La akceptanto estas malpli fervora, ĉar li devas kompensi la bonfarojn per bonaĵoj, por sin liberigi de ŝuldo. Ni tial donas bonfarojn ne pro ruza kalkulemo, kiu celas profiton, sed pro nobla fido kaj liberala pensmaniero, ne timante maldankon.

Resume: nia urbo estas la klerigejo por la tuta Grek'ando, en kiu senescepte ĉiu viro grazie kaj lerte sin montras

kapabla al la plej altaj postuloj. Ke tio ne estas vanta fanfaronado okaze de patriota festparolado, pruvas la potenco de nia ŝtato, kiun ni dankas al tiuj virtoj. Ĉar nun ĝi devas pasi eksterordinaran provon de forto kaj nek niaj malamikoj, se ilin ni venkos, nek la jam subigitaj, plendos pri tio, ke ili estas venkitaj de tiaj, kiuj ne estas indaj je tio. Multnombraj pruvoj atestas evidente la evoluon de nia potenco; ni estas certaj pri la admiro de la vivantaj kaj venontaj generacioj. Ni ne bezonas Homeron glorantan niajn farojn per ĉarmaj kantoj; ĉiuloken surlande kaj surmare nia kuraĝo malfermis al ni la vojon. Por tia naskiĝurbo jen ĉi tiuj mortfalis batalante, decidinte, ne lasi ĝin forpreni de si, — kaj la ankoraŭ vivantaj senescepte konsentas suferi pro ĝi ĉiun penon kaj danĝeron.

Detale mi priskribis la esenceon de nia ŝtato, por pruvi, ke ni kaj tiuj, kiuj ne posedas same valoran havon, ne batalas por egale alta celo kaj ankaŭ por montri, kiom granda estas la gloro de tiuj, pro kiuj mi hodiaŭ devas paroli. Ĉar, kiom ajn da belegajol ni povas glorlaŭdi en nia urbo, — ĝi dankas ilin al la virtoj de ĉi tiuj viroj, kies faroj — malofta koindico — ne estas superataj per tia laŭdo. La vivo-fino de ĉi tiuj viroj pravigis tion, kion ni de la komenco certe esperis pri ilia vireco. Ĉar prave eĉ ĉe viroj, kiuj alitempe ne estas tre estimindaj, oni alte taksas la kuraĝon, se ili mortis por la patrolando kaj volonte pretervidas iliajn ceterajn malbonetajn kvalitojn. Ĉar kompensante siajn mankojn per kuraĝa sintenado, fine ili pli multe utilis ol malutilis al la patrolando. Sed, jen pri ĉi tiuj ni povas diri fiere, ke neniu sin fordonis al la ĝuado kaj riĉiĝemo kaj per tio sin malhardis, aŭ pro la persekutado al riĉiĝo evitis la danĝeron. Pliĝuste ili konsideris la batalon kontraŭ la malamiko kaj la mortodanĝeron la plej bela kaj alta virto. La sukceson ili provis nur esperatendi, sed en tio, kion ili havis antaŭ la okuloj, ili agis kun memfido. Ili pliŝatis batali kaj suferi ol forkuri kaj vivi. Jen kiel la sorto ilin rapide forprenis kaj sentime ili disiĝis de ni en la floro de l' gloro. Jen kiel ĉi tiuj viroj plenumis sian devon por la ŝtato.

La postvivantoj ja petu la diojn pri sendanĝera vivo, sed, se necese, ili ne malpli kuraĝe kontraŭfruntiĝu kun la malamiko. La benon de l' kuraĝo vi klarigu al vi ne nur per longaj paroladoj, aŭskultante, kio kaj kiom da bonaj aferoj dependas de la sukcesplena batalo kontraŭ la malamikoj; pliĝuste vi havu ĉiutage vian patrolandon plastika antaŭ viaj okuloj, kaj vi amu ĝin ĉiutage pli kaj pli. Kaj, se foje ĝia potenco ŝajnas al vi tro granda kaj tro ampleksa, konsideru, ke bravuloj sciantaj kion ĝi bezonas, kaj kion postulas la honoro, akiris tiun grandecon batalante. Kiam ili foje malsukcesis en iu entrepreno, tamen pro tio ili ne refiriĝis timeme, sed oferis sin mem. Kaj tiel agante ili akiris senmortan gloron kaj kiel plej belan tombon ili ricevis ne ĉi tiun, en kiu nun ripozas iliaj korpoj, sed tombon en la koro de ĉiu viro, kie loĝas iliaj faroj ne forgeseble. La tombo de famaj viroj estas ĉie. Pri ili parolas ne nur la kolono per sia surskribo en la hejmlando, ne, ankaŭ eksterlande vivas la memoro pri iliaj nomoj en ĉies buŝo. Ĉi tiujn vi imitu fervore! Serĉu la feliĉon en la libereco, la liberecon en via memfido kaj ne prefervidu la danĝerojn, kiuj vin ĉirkaŭas. Kiu vivas en mizero kaj ne havas plu esperon, ne facile oferos sian vivon, sed certe tiu, al kiu akcidento povas alporti subitan kaj gravan ŝanĝon de feliĉo. Grandanimulon trafas la malgloro, per kiu li kulpiĝis pro malkuraĝo, pli senteble ol la morto, kiun li suferas entuziasmigite por la estonteco kaj grandeco de l' patrolando.

Pro tio mi ankaŭ ne deziras bedaŭri la ĉeestantajn gepatrojn de la mortintoj, sed konsoli. Vi ja scias, kiom ofte ŝanĝiĝas la feliĉo en la vivo kaj, ke vere feliĉa estas konsiderota nur tiu, kiu trovis gloran morton kiel jen ĉi tiuj kaj kiu povis morti por tio, kio estis ankaŭ la feliĉo de lia vivo. Mi bone scias, kiom da ĉagreno vi sentos en la koro memorigote per aliaj pri la foriĝintoj, vidonte tiujn ankoraŭ en la ĝuo de feliĉo, kiu iam ĝojigis ankaŭ vin. Same ni ja ne plendas pri posedaĵoj, kiuj en venonta tempo povus havigi al ni

nekonatan ĝuon, sed pri tiaj, al kies beno ni kutimiĝis. Sed tiuj, kiuj estas ankoraŭ en la aĝo, ke ili povas esperi je infanoj, konsolu sian koron per ĉi tiu espero. La novenaskiĝontoj mildigos en siaj familioj la doloron pro tiuj, kiuj jam ne vivas plu, kaj ankaŭ por la patrolando ekfloros el la nova generacio nova certeco por la estonta tempo. Nur tiu, kiu povas oferedoni infanojn, partoprenas kun plena kaj ĝoja koro en la ŝtatadministrado, Sed kiu ne havas plu esperon pri infanoj pro sia maljuneco, tiu estu kontenta, ke li feliĉe trapasis la pli grandan parton de l' vivo kaj, ke la resto estos nur malgranda. Li konsoliĝu per la gloro de ĉi tiuj mortintoj. Sole la gloro ne maljuniĝas kaj en la jaroj, kiam oni ne povas plu utili pro malforteco, la plej grandan ĝojon ne havigas al ni la monon — kion multaj asertas —, sed la gloro.

Sed vin, filojn kaj fratojn de l' falintoj, atendas grandega konkuro. Ĉar la foriĝintojn ĉiu laŭdas, sed vi, eĉ per kvantego da braveco, ne sukcesos iam ilin egalvalori. Ĉar la envio konstante maldormas pro la konkuranto, kaj volonte oni aprobas nur la farojn de tiuj, kiuj al al la homoj ne baras plu la vojon.

Fine mi devas paroli pri la virto de la virinoj, kiuj nun vivos vidviniĝinte. Kaj ĉitiurilate mi povas ĉion koncizigi jene: Via gloro estos plej granda, se vi restos fidelaj al la karaktero virina t. e., se viroj, ĉu laŭde aŭ riproĉe, parolos pri vi kiel eble plej malmulte.

Per tio mi diris, kion mi devis diris laŭ la leĝo. Sed la enterigitoj jam estas honoritaj per la ago. Iliajn infanojn de nun edukos ĝis matura aĝo la ŝtato kaj per tio dediĉos fruktoportan venkokronon al la mortintoj kaj vivantoj. Ĉar tiu burĝaro havos la plej bravajn virojn, ĉe kiu la plej brava povas esperatendi la plej altan premion.

Nun oferu al la mortintoj la funebran plendon kaj poste iru hejmen.

Traduko el la greklingva (antikva) originalo (Thukidides, Historia Verko, II-a vol., ĉap. 35—64.)



La stranga pordo.

Verkinto nekonata.

Viro iutage mezuris la pordon de la drinkejo de l' vilaĝo. Li mezuris kaj kalkulis, mezuris denove kaj kalkulis.

Dum la tempo popolamaso kolektiĝis kaj rigardis la viron kaj liajn mezuradojn. Li ne estis nekonata viro, sed la plej malbona drinkulo de la loko.

Fine li diris kvazaŭ al si mem: „Kia stranga pordo! Ĝi estas nur du metrojn alta kaj unu metron larĝa. Mi iam havis belegan hejmon, ĝi eniĝis en la drinkejon tra tiu ĉi pordo. Mi posedis domon kaj hejmon, belajn grenkampojn kaj herbejojn, ili iris la saman vojon. Kaj tamen la pordo estas nur du metrojn alta kaj unu metron larĝa! Ĉio, kion mi iam posedis, bonstato, reputacio, honoro, saneco, ĉio traĝis tra tiu ĉi pordo. Estas nur mi, kiu jam ne povas eniri tra ĝi, ĉar mi ne havas monon plu.“

El la sveda lingvo tradukis
Axel A. Helm.

Vespera idilio.

„Kial?“ li demandis. „Kial mi meritas vian koleron?“

Ŝi diris nenion kaj klinis sian ruĝiĝintan vizaĝon. „Nun mi ne povas diri al vi,“ ŝi respondis post mallonga paŭzo.

Ili sidis ĉe la maro. La senfina marego etendis sin antaŭ ili. Rapidaj nuboj flugis en la blua ĉielo. La suno klinis sin al okcidento. Ĝiaj lastaj radioj purpurnis la marajn ondojn. Trankvila vento ventumis. Ĝi ludis inter la folietoj de la arboj, ĝi ludis ankaŭ kun la bukloj de la juna knabino.

Ili sidis sur benko. La blankaj betuloj klinis siajn branĉojn teren. La flavaj folioj de l' arboj kovris la teron. La ŝipoj kaj la barkegoj fendis la bluajn ondojn de l' maro. Kaj la knabino rigardis teren kaj la knabo sian karan.

„Kial?“ li demandis.

„Nun ne!“ ŝi reiris. „Estas malfrue. Ni devas foriri.“

Ili stariĝis kaj brako ĉe brako foriris al la luma urbo.

Geo Harŝev.

Parsifal.

Ho! Parsifal! Ho! kruelulo! Ĉu nenio povas tuŝi vian koron — ŝtonon? Kompatu, kompatu ŝin, ĉar ŝi velkos — pli bela ol ĉiuj floroj, ŝi velkos en sensaĝa enuo sen vi, kruela Parsifal.

Asen Grigorov.

Rapida ventego.

La vento ekventumis tra la vasteco, disvualis la malhelan ĉielon. La mallumaj nuboj ekflugis kun freneza forkuro.

La montaj pintoj levis fiere siajn kapojn, la ĉiela blueco ekklarigis kaj ekvibris minute.

Petro Stalevski.

Enigmoj.

1. Flugilojn ĝi movas, sed flugi ne povas.
Ventuelilo.
2. Blua tegmento sen la ĉarpento.
Ĉielo.
3. Mi estas korna — sed ne bovo, mi havas ŝelon — sed ne estas ovo.
Limako.
4. Ĝi ne bojas, ne rigardas — hundeto pordon gardas.
Seruro.
5. Fera barbo, korp' el arbo,
Hakilo.
6. Ĝi ĉiujn nutras, neniam putras.
Salto.
7. Belvesta fianĉo flirtas sur branĉo.
Flago.
8. Muŝoj blankas — varmo mankas.
Nego.
9. Sen fenestroj, sen pordegoj — loĝas dome mil kolegoj.
Melono.
10. Du bazoj, kvar nazoj.
Kuseno.
11. Ĝi ŝatas laŭbon — portas ŝraŭbon.
Limako.
12. Blanka erinaco kuras al la ŝmaco.
Dentobroso.
13. Gustas lakto sen selakto el bovino sen la spino.
Pluvo.
14. Nazo fina — vosto lina.
Kudrilo kun faden.

Onklo Pesto.